
# KALEJDOSKOPO

K 35 SEPTEMBRO 1980 Kvaronjara eldono



La pego serĉas insektojn.

Legu pri ĝi sur paĝo 2

Sur la frontpaĝo vi povas vidi pegon.

Rigardu la akran bekon.

Per ĝi la pego povas bori en arbon kaj kapti insektojn, kiuj sin kaŝas tie.

Rigardu la ungojn.

Tiuj povas tre forte teni, ĉu ne?

Rigardu la voston.

Tiu 'ankras' la birdon. Tiel la birdo povas stari vertikale dum ĝi boras en la arbon!

ĈU ĈIUJ BIRDOJ HAVAS TIAN BEKON?

Tute ne!

Jen tiu de pasero, kiu ŝatas semojn kaj etajn insektojn:



kaj tiu de aglo, kiu kaptas bestojn:



kaj de pelikano, kiu ŝatas plenigi la sakon sub la beko per fiŝoj!:



Teatraĵeto

## La Almozulo.

Roloj: Dommastrino. Almozulo.

Sceno I

(La dommastrino estas en la kuirejo. Estas frapo sur la pordo)

D. Kiu estas tie?

(malfermas la pordon kaj vidas almozulon)

Ho! Fremdulo, kion vi volas?

A. Donu al mi ion por manĝi, mi petas.

D. Mi donos al vi tagmanĝon kondiĉe, ke vi purigos la straton antaŭ mia domo.

A. Jes, Jes, mi konsentas. Mi estas tre malsata.

D. Jen, vidu, sur la tablo estas bovaĵo, terpomoj, iom da fromaĝo, pano kaj glaso da biero.

A. Mi dankas vin. Mi formanĝos ĉion.

(D. eliras)

(Kurteno)

Sceno II

D. (envenas) Nun vi jam manĝis. Mi donos al vi ĉi tiun grandegan balailon por purigi la straton antaŭ la domo.

A. Ho, sinjorino, mi tute ne bezonas tiun aparaton. Mi neniam uzas balailon por purigado.

D. Ne balailon! Kion do vi uzas? Ĉu ŝovelilon?

A Ne, sinjorino. Mia metodo estas PREĜI POR PLUVO!

(A. foriras)

D. Fripono! Ho ve! mi estas malfeliĉa virino. Li formanĝis ĉion kaj nun li foriras. Certe mi ne vidos lin denove!

(Paŭzo dum tondro aŭdiĝas) Ho ve! mi ege timas ŝtormojn. Mi

devas fermi la fenestron. Rigardu la pluvon! Estas vera diluvo.

(Ŝi elrigardas al la strato)

Ho, la strato nun estas pura pro la pluvo.

(Ŝi aŭdas bruon ĉe la pordo. Ŝi iras kaj malfermas ĝin).

Estas vi denove, vi fripono!

A. Havu kompaton, sinjorino. Mi petas, donu al mi ŝirmon kontraŭ la ŝtormo.

D. Ne! Foriru! Mi ne akceptas vin en mia domo. Vi preĝis por la pluvo. Nun preĝu por SUNBRILO!.

P.Strapps.

---

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| H | A | M | L | E | T | S |
| E | Ŝ | A | T | U | T | A |
| B | A | Ĉ | A | B | E | O |
| A | R | A | M | A | Ĉ | E |
| Z | S | B | Ŝ | I | K | T |
| K | L | S | A | Z | Ĉ | A |
| S | N | A | L | D | A | M |

*Forstreku ĉiujn literojn, kiuj aperas pli ol unufoje. Reordigu la restajn literojn por fari nomon de iu birdo.*

Solvo paĝo 15.

Colin Quayle

## Porkido kaj Kokido

(Litova fabelo)

Foje vojaĝis cigano kun litovo. Ili ambaŭ malsatis. La litovo havis porkidon kaj la cigano kokidon.

La cigano diris al la litovo: "Ni manĝu unue vian porkidon kaj poste ni manĝos mian kokidon."

"Bone", respondis la litovo. Do, ili formanĝis la porkidon kaj iris plue.

Post tri horoj ili denove malsatis kaj haltis por iom ripozi. La cigano diris: "La kokido estas bongusta objekto, sed por du ĝi ne sufiĉos. Unue ni dormu kaj kiu havas la plej belan sonĝon tiu manĝos la kokidon". La litovo konsentis.

La cigano tuj endormiĝis sed la litovo ne povis dormi pro malsato. Do, li formanĝis la kokidon.

La cigano vekiĝis kaj tuj komencis rakonti pri sia sonĝo. "Aŭskultu, amiko! Dum mia sonĝo anĝeloj venis, prenis min kaj forportis en la ĉielon. Tie la bona Dio sidigis min apud si, demandis min pri novaĵoj sur la tero... Kaj la sankta Patrino alportis diversajn bongustaĵojn...Kaj kion vi sonĝis?"

"Mi", respondis la litovo malrapide, "mi vidis, ke vi fartas tre bone en la ĉielo. Mi supozis, ke vi ne estos malsaĝulo por reveni sur tiun ĉi mizeran teron. Do, mi formanĝis vian kokidon."

---


Memoru-
ke estas friponoj en ĉiu raso.

Juĝu fremdulon laŭ lia karaktero kaj ne laŭ lia raso!

---

# V I R E T O   E N   A R B A R O

trad. Erna Rieckmann-Lindhwad.    Bruselo Belgio




Mantelo bela, ruĝa ornamas lin,
ĉapeto bela, nigra amuzas nin.
Kiu estas la viret' kun la ruĝa mantelet'
en la bela, verda arbaret'?

Vireto en arbaro, ni konas lin;
Rozbero la sovaĝa, ni amas vin!
Tiu estas la viret' kun la ruĝa mantelet'
en la bela, verda arbaret'.

## GANGALA KONCERTO !

Nur kviete sub la arbo
Zum-zumetas la skarabo.
    Jen, ektrilas eta birdo,
    Ektamburas la tapiro,
Bele kantas la ŝakalo,
Jam muzikas la ĝangalo.
    Violonas verda grilo,
    harmonikas krokodilo.
Nun eksonas forta kanto,
Ho, trompetas elefanto.

    Fine venas la leono,
    Al ĝi plaĉas tre la ĥoro...
Sed pro leona baritono
Ĉiuj kuras for de l'sono!

---


## TINKO kaj INKO

Ekscitita palas Tinko
englutita estas inko.
    -Min embuskas mortatako
    pro la inko en stomako!
    Kion fari? Diru veron!

- Tuj englutu sorbpaperon...,

Ludmila Jevsejeva.

LA RUZULOJ



Ĉe la fundo de la maro,
ja restadas la fiŝaro.

Kiam fiŝkaptisto estas
Fiŝoj - Hi! Hi! Hi! - ne restas.


===============


Tiu, kiu faris la desegnon por "La Ruzuloj" poemeto faris grandegan eraron!

Nepre trovu ĝin!!!


===============

La solvo estas sur paĝo 15.






V v        *Vv*





Morsa kodo:


V = ... -

















Z z    Z z

Morsa kodo:

Z = - - . .










## La Esperanta Morsa Kodo.


| | | | |
|---|---|---|---|
| A | . - | K | - . - |
| B | - . . . | L | . - . . |
| C | - . - . | M | - - |
| Ĉ | - . - . . | N | - . |
| D | - . . | O | - - - |
| E | . | P | . - - . |
| F | . . - | R | . - . |
| G | - - | S | . . . |
| Ĝ | - - . - . | Ŝ | . . . - . |
| H | . . . . | T | - |
| Ĥ | - . - - . | U | . . - |
| I | . . | Ŭ | . . - - |
| J | . - - - | V | . . . - |
| Ĵ | . - - - . | Z | - - . . |

Kion ni faros dum la tendumado ?






Kio estas la vorto en la ringoj?

Solvo sur paĝo 15

Ekspozicio de Infandesegnaĵoj.

Libera temo. Dorse skribu nomon kaj aĝon. Ni rekompencas laŭdezire. Ni ricevu antaŭ decembro 1980.

ESPERANTO-GRUPO, str.Forn 19 - Moyà (Barcelona) -Hispanio.

---

1981 SAT Kongreso de Esperanto okazos en Bazelo, Svisio, - 1 - 8 aŭgusto.

---

## Mia Lampŝirmilo .

La lampo sur la tableto apud la lito falis.
La kartona konusa parto de la lampo ŝiriĝis.
La drata frămo en la konuso ne difektiĝis.
Do, mi elektis pecon de iom fleksebla kartono - flava por harmonii kun la ĉambro-koloroj.
Tiam mi desegnis duoncirklon 3½cm radio.
Poste, ĉirkaŭ ĝi mi desegnis duoncirklon 10cm radio.
Mi tondis ĉirkaŭ la granda duon-cirklo, sed lasis aldonan pecon, kiel vi vidas en figuro 1.

Fig. I





Fig. 2.



Mi fortondis la malgrandan duoncirklon.
Mi decidis ornami la ŝirmilon iomete kaj farbis brunajn bandojn, kiel en Fig. 2. Nun mi kurbis la kartonon en konuson kaj gluis la aldonan pecon sub la alia fino de la duoncirklo.

SOLVOJ

de paĝo 4: Hirundo.

de paĝoj 8 kaj 9:

Baleno (la granda besto en la mezo de la bildo) ne estas fiŝo. Ĝi estas mamulo, kiel simio, kato, homo, ktp..

de paĝo 10 V - vulpo vosto vizaĝo
vazo valizo vagonaro

11 Z - zigzago zebro
zepelino (frua germana milita aerbalono)

de paĝoj 12 kaj 13:

1. d E segnas
2. ek S kursas
3. s P ortas
4. g E stadas
5. do R mas
6. n A ĝas
7. ler N as
8. kan T as
9. fiŝh O kas

= ESPERANTO.

---

Kovertoj. Pro tio, ke mi ne sukcesas aĉeti novan stokon de la ĝusta mezuro por nia gazeto (10 coloj x 7 coloj), mi devas faldi la gazeton por meti en ankoraŭ aĉeteblaj kovertoj ( 9c. x 4c.). Pardonu!

---

ADMINISTRACIO de Kalejdoskopo
S.A.T. Gazeto por Geknaboj.

Redaktorino : Ethel Prent, 29 Farrance Rd, Chadwell Heath,Essex,
Romford, RM6 6EB, Anglio.

Telefona numero: 01-597 1347(ne uzu 01 se vi estas en Londono)

Jarabono: Por kvar eldonoj post ricevo de pago........ £0,75

Transpago de mono:

Bonvolu pagi per poŝtoficeja ĝiro se tio eblas el via lando, al W.E.M. konto 35 411 0004(sama adreso kiel supre). La Brita Poŝtĝira Centro estas: National Girobank, Bootle, Merseyside, GIR GAA. Ŝajne en kelkaj landoj oni devas tion citi aldone al niaj nomo kaj numero.

aŭ pagu al perantoj. En diversaj landoj estas SAT-perantoj kaj tiuj transpagos por vi la abonojn pere de SAT Parizo. Petu informon pri peranto de ni aŭ de SAT Centro,67 avenue Gambetta, PARIS, 75020, Francio.

aŭ pagu pere de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, NL3015 BJ Nederlando.

Nepagipovaj landoj:

Kelkaj geamikoj donacas abonojn por infanoj kaj geinstruistoj en tiuj landoj. Mi petas ricevantojn de tiuj donacitaj abonoj, ke ili sendu poŝtkarton iam dum ĉiu jaro.

Por kvantaj mendoj;

Por 10 aŭ pli da unu eldono al unu adreso ni ofertas rabaton inter 10% kaj 20%.

Rilate internaciajn respondkuponojn:

Por ĉiu kupono mi enspezas la afrankon por sendi leteron eksterlanden. Nun tio estas 13½ pencoj.
Bonvolu sendi almenaŭ 6 kuponojn!

NE JUĜU LAŬ KIOM VI DEVAS PAGI POR AĈETI KUPONON !!